



BULTENO

DE LA GERMANA ESPERANTA FERVOJISTA ASOCIO

Organ der Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten im Bundesbahn-Sozialwerk

Fondita 1952

Numero 4

Julio/Aŭgusto 1963

REGENSBURG

iam renkontejo por la tuta Eŭropo atendas en aŭtuno la
fervojistajn esperantistojn

Dum ankoraŭ la germanaj fervojistoj pasigas sian libertempon kun siaj familianoj kaj pli multaj daŭrigas sian servon por la ĝenerala bonfarto, la preparoj por la 7a jarkunveno dum la 19a kaj 20a de oktobro 1963 bone progresas. El Regensburg ni ricevis la ĉi suban raporton.

La redakcio

Regensburg estas neesplorable malnova. La neordinara situo de la urbo apud la plej norda flupunkto de la Danubo — la dua laŭ grandeco el la ĉiuj riveroj — estas la kaŭzo, ke en Regensburg estas troveblaj signoj de ĉiuj kulturoj de post ĉirkaŭ sesmil jaroj, do eĉ el la ŝtonepoko.

Regensburg havas tri historiajn kaj pli ol sepdek sageajn kaj poetajn nomojn. La kelta nomo **Rathaspona** ankoraŭ nun estas ekkonebla en la romanaj lingvoj ekz. en „Ratisbonne“ de la franca lingvo. La nomo por la romana fortikurbo estis „Castra Regina“, kio signifas „Kastelo apud la Regen“ („Regen“ estas rivero, kiu ĉi tie enfluas el la nordo en la Danubon). La bavaranoj tradukis ja nomon per „Reganespur“.

Mallonga historio de Regensburg: Koloniĝita, depost ekzistas homoj, grava loko ĉe la keltoj; potenca, malfruromana fortikaĵo; unua bavara ĉefurbo; imperiestra palaco kaj regadejo de la Karolingoj; duka, reĝa kaj episkopa urbo samtempe, eŭropa komerc-metropolo en la frua kaj malfrua mezepoko; depost la reformacio samtempe katolika kaj protestanta urbo de la Regna Parlamento kaj fine sidejo de la Konstanta Regna Parlamento de 1663 ĝis 1806. De 1810 la urbo

apartenas al Bavario. Ĉi tiu urba historio ne nur estas parto, sed spegulo de la tutgermana historio.

La du famaj ekkoniloj de Regensburg estas: la **Ŝtona Ponto** konstruita de 1135 ĝis 1146, majstroverko de la malfrua mezepoko, la **Katedralo de Sankta Petro**, konstruita inter 1275 ĝis 1520 (la du turoj estas finkonstruitaj en 1860), la ĉefverko de la gotiko en Sudgermanio.

La vidindaĵoj de Regensburg estas tiom multnombraj, ke oni nomis la urbon neesplorable: dudek kvin konservitaj historiaj preĝejoj kaj kapeloj; la **Porta Praetoria** el 179 p. Kr., la Norda Pordego de la romana fortikaĵo; la urbmuŝoj de la romanoj; abatejo de Sankta Emeramo, fondita en la 5a jarcento; la „Skota Preĝejo de Sankta Jakobo“ kun la fama pordego el 1200; la turdomoj de la patricianoj el la 13a kaj 14a jarcento; la Malnova Urbodomo kun la salonego de la Konstanta Regna Parlamento kun juĝejo. — Promenante oni povas trapasi du mil jarojn dum du horoj, sed pli rekomendinde estas uzi por tio du tagojn, kaj se oni eĉ utiligas du semajnojn, oni ĉiam ankoraŭ povos trovi ian vidindaĵon.

Kiel historia urbo prezentas Regensburg mal-falsajn superlativojn: la plej malnovan fonddokumenton de germana urbo (romana monumenta ŝton-tabulo), la plej malnovan germanan ponton (Ŝtona Ponto), la plej malnovan romanan urbpordegon en Germanio (Porta Praetoria); la unuajn plastikajojn en konstruaĵoj (pordeĝguroj ĉe Sankta Emeramo); la solan origine konservitan demandejon (torturejon) el la mezepoko; la unikajn turdomojn (kastelojn de patricianoj)

Jaŭ itala stilo norde de la Alpoj. Krome la Konstanta Parlamento estis la unua germana parlamento ĝenerale. Krome en Regensburg oni trovis la plej malnovan — amleteron.

En Regensburg estiĝis riĉenhavaj muzeoj kaj kolektejaĵoj diversspecaj. La Urba Muzeo kun pli ol cent ejoj; la muzeo de la Konstanta Parlamento en la Malnova Urbdomo; la rememorigejo pri Kepler, la fama astronomo; la kastelo de la princo Thurn und Taxis kun muzeo de ĉiuspecaj veturiloj; la Art-Ekspozicio en la Urba Parko; krome valoraj bibliotekoj.

Konstraste al sia signifo la urbo Regensburg nur estas malmulte konata. La kaŭzo: kiam en 1810 la urbo bavarigis, ĝi fariĝis simpla urbo inter multaj en Bavario. Nur post la fino de la lasta milito oni denove ekkonis ĝin kaj nun la urbo evoluis al la kvara inter la grandurboj de Bavario (ĉirkaŭ 130 000 loĝantoj) per kreo de diversspecaj industriaj entreprenoj.

Sed Regensburg ne nur estas urbo kun artaj monumentoj kaj rimarkindaĵoj, ĝi ankaŭ estas gastama urbo: Ekzistas multaj aleoj kaj kvin parkoj. Kiel frandaĵojn oni prezentas „Kolbasetojn Regensburgajn“ kaj rostitajn kolbasetojn, krome kreskas tie speco de famaj rafanoj bongustaj kune kun diversaj bierspecoj. Kaj ĉion oni povas ĝui en belaj kaj historiaj gastejoj.

La famo de Regensburg estas krome multflanka. En ĝiaj muroj kantas la mondkonataj „Katedral-Paseroj“, la knaba horo de la katedralo. Regensburg havas la plej okcidentan havenon por la ŝiptrafiko sur la Danubo (nun plivastigita) funkcia ĝis la Nigra Maro (jare 6 000 ŝipoj). Bonan reputacion la urbo ankaŭ havas pro la sidejo de la princoj de Thurn und Taxis, bonefaremaj kaj entreprenemaj.

„Regensburg situas vere bele“ jam skribis Johann Wolfgang von Goethe en sian taglibron. Rajte, ĉar ĉirkaŭ la urbo situas diversaj pejzaĝoj, kiuj montras la naturon diversspece kaj multajn artaĵojn vidindajn. De Regensburg oni atingas la mezaltajn montarojn de Bavara Arbaro, la Ĵurason de la Superpalatinato kaj la Danuboteritorion de Malsupra Bavario. Ekskursoj al la „Walhalla“, greka templo kvarangula kun marmorbustoj de famajgermanoj, kaj „Befreiungshalle“, ronda greka templo memore al la milito 1813 estas tre kontentigaj.

Do atendas vin multaj travivaĵoj, pri kiuj vi volonte rememoros post la ĉi-jara kongreso fervojaŝta.

Ludwig Goppel

Vorläufiges Programm für die 7. Jahreshauptversammlung in Regensburg

Freitag, 18. Oktober

14.00 Uhr: Empfangsbüro im Keplerbau (3 Min. vom Bahnhof) geöffnet

16.00 Uhr: Presseempfang

19.00 Uhr: Sitzung des Arbeitsausschusses

Samstag, 19. Oktober

9.00 Uhr: Stadtrundgang (2 Stunden), anschließend Busfahrt nach Donaustauf zur Walhalla (2 Std.)

13.00 Uhr: Gemeinsames Mittagessen

14.00 Uhr: Arbeitssitzung der Bezirksbeauftragten

14.00 Uhr: Sprachprüfungen, schriftl. Teil

14.00 Uhr: Stadtrundgang (wie am Vormittag), evtl. Besichtigung der Güterabfertigung mit vollautomatischer Umladehalle

18.30 Uhr: Gemeinsames Abendessen

19.30 Uhr: Festabend mit Tanz

Sonntag, 20. Oktober

9.00 Uhr: Gelegenheit zum kath. Gottesdienst mit Predigt in Esperanto

10.00 Uhr: Sprachprüfungen, mündl. Teil

11.00 Uhr: Filmvorführung, Tonbandvortrag

13.00 Uhr: Gemeinsames Mittagessen, anschließend Busfahrt zur Seidenplantage

15.30 Uhr: Verabschiedung

Anmeldevordrucke

sind ab Anfang September bei den Bezirksbeauftragten erhältlich. Anmeldeschluß: 3. Oktober.

Mahlzeiten

können im Kongreßgebäude (Keplerbau) zum Preis von 1,80 bis 4,00 DM eingenommen werden.

Unterbringung

in Hotels kostet in der Preisgruppe I 7,00 bis 17,00 DM, in der Preisgruppe II 5,00 bis 7,00 DM, in der Preisgruppe III 3,00 bis 5,00 DM.

Esperanto-Sprachprüfung

Während der 7. Jahresversammlung in Regensburg besteht wiederum Gelegenheit, die Sprach- und Kursusleiterprüfung für Esperanto abzugeben. Allen sprachgewandten Mitgliedern unserer Vereini-

gung, deren Familienangehörigen sowie sonstigen Esperantisten wird empfohlen, sich an einer dieser Prüfungen zu beteiligen. Wir geben diesen Hinweis schon jetzt, damit genügend Zeit zur Vorberei-

tung zur Verfügung steht. Das Zeugnis über die bestandene Prüfung wird vom Deutschen Esperanto-Institut erteilt. Anmeldung bei: Dr. Wilhelm Lang, Prüfungsamt bei der Bundesbahndirektion Frankfurt (Main). Basa 955/1501.

GEFA

El la libraro

Ĉinio politikas

La Landlima Problemo inter Ĉinio kaj Hindio, eldonita de la Fremdlingva Eldonejo Pekino, Ĉina Popola Respubliko, 1963. 133 paĝoj, 15 grandformataj mapoj.

La broŝuro senkommentarie prezentas la tekstojn de kelkaj ĉinaj dokumentoj esprimantaj la ĉinan vid-kaj starpunkton pri la landlima problemoj kaj konfliktoj inter Ĉinio kaj Hindio: du leteroj de la Ĉina Ĉefministro Ĝou Enlaj, la unu al la Hinda Ĉefministro Nehru (1959), la alia al la Gvidantoj de Aziaj kaj Afrikaj Landoj (1962), al kiu estas aldona 15 mapoj montrantaj la historie kutiman landlimon inter Ĉinio kaj Hindio; plie, Noto de la Ministerio de Eksteraj Aferoj de la Ĉina Popola Respubliko al la Hinda Ambasadoro en Ĉinio (1959); krome, du Deklaroj de la Registaro de la Ĉina Popola Respubliko (1962), kaj fine artikolo de la ĵurnalo „Remdin Ribao“ pri „La Filozofio de Nehru en la Lumo de la Landlima Problemo inter Ĉinio kaj Hindio“ (1962).

Jen Esperanto sur aktuala politika pargeto! Kaj kial ne!

Esperanto estas ja nur lingva rimedo! Estas nun la vico de Hindio, sammaniere publikigi siajn koncernajn dokumentojn en la internacia lingvo Esperanto.

Laŭ la ĉina versio la du grandaj landoj ne havas definitive fiksitan landlimon. Tial konstante regis la danĝero de lokaj armitaj kolizoj. Por fini la nekontentigan staton, Ĉinio ripete proponis al Hindio, fiksi la landliman linion per paca kaj amikeca interkonsento. Tamen la problemoj pli kaj pli akriĝis, ĉar la politika filozofio de Nehru estas ekspansiisma kontraŭ Ĉinio.

Al fervojfaka bulteno ne taŭgas, esprimi tiun aŭ tiun opinion pri la problemoj. Personoj kun politika intereso certe trovas sian ĝuon, legante la broŝuron skribitan en bona Esperanto.

G. Korth

Pseŭdoreligio

LOGIKO eldonita de Martinus Instituto, Kopenhago 1962., en traduko de ing. I. Schleicher; presita sur 200 paĝoj de unuaklasa papero, formato 18 x 25, fortike bindita kun blanka kovrilo el artefarita ledo kaj ora surpresoj; 22,- danaj kronoj, havebla ĉe la supra Instituto.

La verko, oka laŭvice eldonita en Esperanto de la Martinus Instituto, prezentas iaspecan suplementon al ties baza ĉefverko „Livets Bog“, en la „Logiko“ ofte citata, tamen sen ia plia klarigo. Sendube interesa fenomeno, ke libro tiel altnivele tradukita el la dana originalo, kiel la „Logiko“, verkita en tiel inteligenta stilo, pritraktas temon, pli ĝuste temaron resp. tutan mondkoncepton, kaŝate sub titolo, efikanta certe pli konkrete ol la pritraktata materialo mem. En nia nuna mondo, en kiu la aŭtoro identigas materialismon kun religiismo, precipe — kvankam ne klare dirite, sed klare aludite — kun tiu „papa“ (hic!), nomante ambaŭ superstiĉojn

samkategoria, kiu „neniam antaŭe... disponis pri tiel efikaj potencrimedoj, kiel ĝuste nun“, li malagnoskas esti aŭtoro de nova religio aŭ kredo. Tion ni kredu al li... Li mem cetere kondamnas ĉiun kredon, apogante sin al pli evoluinta menso de morgaŭaj homestajoj. Eksterdube estas, ke la libro enhavas plurajn interesajn filozofiajn asertojn kaj ankaŭ logikajn konstatojn kaj konkludojn. Tamen ne centprocente sen kontraŭdiro. Hodiaŭa scienco ne estas vera scienco, ĉar mense limigata per empirio, mezuroj, ciferoj. Sed, aliloke: ... vera scienco kun tute nova, matematike korekta mondbildo.

La libro lingve kontrolita

de la Literatura Komitato de S.A.T., impresas impone kaj per sia eksteraj dece ornamas ĉiun Esperanto-bretaron aŭ bibliotekon. Preseraroj tre raraj (paĝo 26 lin. 9 de supre „ne kiam“, devus „nek kiam“; p. 36 lin. 9 de supre „onin“ anst. „oni“; p. 103 kol. 2 lin. 7 de sube „Pa“, devus „La“ k.a.). Por pli simpla homo-esperantisto, leganto de tiu libro, restas sole mistera, ĉu la tradukinto aŭ la verkisto tra la tuta verko interŝanĝis 3 el la 10 bibliaj ordonoj laŭ ilia vico. Sen indiko, kies kulpo resp. merito tio estas, la eraro tamen troviĝas honeste piednotita ĉe la librofino.

I. Sp. (Zgb.)

Heitere

Schulerinnerungen

Das graue Pennal von Carl Johannes Rummel, 294 Seiten, gebunden. Droste-Verlag Düsseldorf. Preis 9,80 DM.

Es ist ein köstliches Erinnerungsbuch. Einmal findet sich in ihm auch Esperanto erwähnt. Aber nicht deswegen sei es empfohlen, sondern weil es aus der Feder eines Mannes stammt, der im Hauptvorstand des Bundesbahn-Sozialwerks seit vielen Jahren unsere Belange mit freundschaftlichem Wohlwollen vertritt. Lassen wir uns von C. J. Rummel noch einmal in die Schulzeit zurückversetzen. Da tauchen sie auf, ehrwürdige und auch lächerlich erscheinende Pauker sowie Schüler aller Altersgrade und Charaktere. Die oft wehmütigen Vergleiche mit dem Heute und nicht zuletzt die Mischung von Heiter-Besinnlichem machen die Stärke dieses Buches aus, das in einer schlesischen Stadt spielt. Nur-Esperantisten sind allerdings die reichlichen Latein-Zitate nicht ohne weiteres verständlich.

W. B.

Velkiĝis la famo . . .

Dum jardekoj Llanfairpwllgwyngyllgogerwyrndrobwlllantysiliogogoch elprofitis la famon posedi la plej longan lok- kaj stacinomon de Britujo, eble eĉ de la tuta mondo. Nun la famo pasis for. D-ro Iorwerth Peate, kuratoro de la Kimra Folkloro Muzeo, antaŭ nelonge informis, ke la nomo ne estas aŭtentika. La origina loknomo konsistas el nur 12 literoj: Llanfairpwll — angle: St. Mary by the Pool. En la 19a jarcento iu loka ruza tajloro laŭdire ekhavis la ideon, aldoni 46 pliajn literojn, tiel ke la nomo fariĝis kvazaŭ novelo (en Esperanto

proksimume: „preĝejo de Sankta Maria en la valo de la blanka avelujo proksime al la rapida vortico de la ruĝa kaverno de Llantysilio“). La sciigon de la sciencisto elvokis la propono, ke la stacidomo, jam destinita al malkonstruado sekve de raciigado, estu rekonstruota en muzeo. Llanfairpwll dum jaroj profitis de tiuj vojaĝintoj, kiuj venis en la vilaĝon en Kimrujo nur, por akiri la ses kolorojn longan kajobileton kun la multaj literoj kiel memoraĵon.

(Traduk. el „Das Flügelrad“,
n-ro 5/63)

NI LEGIS EN . . .

Bulgara Esperantisto, organo de la Bulgara Esperanto-Asocio, donas (en majo) lastajn komunikojn por la laŭdire „plej granda postmilita kongreso“.

Bulteno de la aŭstria sekcio de IFEF, raportas (en junio) pri la ĝeneralkunveno en Knittelfeld kaj pri la digkonstruado en Nederlando.

DEFA-Bulteno de la Dana Esperantista Fervojista Asocio skizas (en julio) la kadron de la venonta IFEF-kongreso en Bruselo.

DIE WELT, norddeutsche Tageszeitung, bringt (im Juni) unter der Überschrift „Esperanto bei der Bundesbahn“ einen Eigenbericht über den IFEF-Kongreß in Stoke-on-Trent.

El Popola Ĉinio, eldonata de la Ĉina Esperanto-Ligo, plezurigas (en n-ro 3) per bonkvalitaj kolorbildo de artverkoj el la 8a jarcento. Interesaj estas la diversaj opinioj pri la ortografo de propraj nomoj.

Esperanto en Skotlando dediĉas artikolon al la mondfama skota esploristo David Livingstone kaj al ties meritoj por la ĉesigo de la sklavkomerco.

Franca Esperantisto provas (en majo) demonstri, ke en Etiopio ekzistas popularaj universitatoj, kiuj funkcias laŭdire jam de 1600 jaroj.

HEROLDO nomas (en n-ro 11) la junularon la ĉefa sukcesiganto de la pasinta IFEF-kongreso.

Jugoslavia Esperantisto celas (en n-ro 3/4) per severa kritiko, ke la landa organizo fariĝu serioza, socia faktoro.

Jugoslavia Fervojisto tre akcentas sian nunan turisman karakteron per

artikoloj pri Primošten, Kroatio, Belgrado kaj la nova fervojista kampadejo Rogoznica.

Junge Sammler, internationale Briefmarkenzeitung, veröffentlicht (im Februar) zweiseitigen Artikel über Esperanto-Briefmarken und die Internationale Sprache.

La Fervojisto, organo de la franca IFEF-sekcio, direktas (en junio) la atenton al problemoj de la estraro, terminaro kaj fakprelegoj.

NOVA CIVITO, esperantigita katolika revuo, elĉerpas (en marto/aprilo) travivaĵojn de la spirito de tri ĝis sep jaroj.

Rad und Schiene, Nachrichtenblatt der Deutschen Bundesbahn, bringt (im Juli) unter der Überschrift „Esperanto gilt bei der DB etwas“ einen Bericht über den IFEF-Kongreß in England.

Regensburger Informationen, herausgegeben vom Städt. Fremdenverkehrsamt Regensburg, weist in seiner Juni-Ausgabe auf die kommende Tagung der Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten hin.

THE WORKER ESPERANTIST de la Brita Laborista Esperanto-movado, substrekas (en junio) la gravecon kaj bon sukcescon de la pasinta IFEF-kongreso per nacilingvaj kaj esperanto-artikoloj.

La plej malrapida homo ne perdante sian celon el la okuloj iras pli rapide ol tiu, kiu erariĝas sencele.

Lessing

Korespondadon kun germanaj fervojistoj deziras:

s-ro Eitici Ŭatanabe, 40 ĉihaja — ĉo 4, Toŝima — ku, Tokio/Japanio

s-ro Johano Czako, Bovos S u. 40, Szentes/Hungario

s-ro Petro Varga, Mámask u. 4, Szentes/Hungario

s-ro Miĥaelo Gerc, Damjanic u. 2/a, Szentes/Hungario.

Knabo, 13jara, filo de esperantista familio, deziras korespondi kun sam-aĝulo por plibonigi sian scipovon en la germana lingvo. Adreso: Familio Diot, 43, Rue Auguste Poulain, St. Denis (Seine) / Francio.

Helpo al Jugoslavio

Tuj post la tertrema katastrofo en Skopje (Jugoslavio) la GEFA-estraro spontane decidis transferi la sumon de 50,— gm al la kolektiva konto favore al la tieaj viktimoj.

Samalta sumo estas donacita lastan jaron okaze de la inunda katastrofo en Hispanio.

EL LA GRUPOJ . . .

Mainz. 70 francaj gekolegoj kaj siaj germanaj geamikoj faris ŝipveturadon sur la Rejno la 7an de julio. En Bingen la gaja grupo ensipiĝis. Laŭlonge de famaj vinlokoj la ŝipo prenis sian vojon. En St. Goar ĉe la dekstra riverflanko. La ruino Rheinfels (Rejnroko), la plej granda kastelo laŭlonge de la Rejno, estis la sekva celo. La gvidadon transprenis s-ano Lowitzer, kiu estas UEA-delegito en Bingen. Posttagmeze la ŝipveturado daŭriĝis ĝis Koblenz. La partoprenintoj kore dankis al la aranĝintoj, precipe al s-ano Ritthaler, la komisiito por Esperanto de la fervoja distrikto Mainz.

Aliĝo por la jarkunveno en Regensburg

GEFA-anoj aliĝu, kiel anoncite en germana lingvo sur la paĝo 2. Gastoj el Germanio kaj eksterlando petu aliĝilon de „Germana Esperanta Fervojista Asocio — sekretariejo —, 6 Frankfurt (Main) 9, Karlstraße 4—6“ aŭ rekte de la LKK „f-ino Marg. Kammerer, Brückenbüro der Bundesbahndirektion, 84 Regensburg“